





foto prenita de JJS en la 8-a de majo 2010, en la sidejo de Portugala Esperanto-Asocio

Eduardo Novembro (centre)

komerca korespondisto, aŭtoro de *Liberaj tempoj*, de *Etaj rakontoj* kaj konstanta verkisto de *La Karavelo*, kie aperas liaj tradukoj kaj originaj verkoj.

António da Silva Almeida (maldekstre)

kapitano de la portugala aerarmeo, unua reviziisto de la verko *Liberaj tempoj*, aŭtoro de la vortaroj *Dicionário Esperanto-Português*, *Dicionário Português-Esperanto* kaj de aliaj esperanto-verkoj.

João José Santos (dekstre)

filologo pri la portugala, latina kaj helena, aŭtoro de la lernolibro *Esperanto em 30 horas*, fondinto de la magazino kaj eldonejo *La Karavelo*, editis kaj eldonis la verkon *Liberaj tempoj*, i.a.

Liberaj tempoj

EDUARDO NOVEMBRO



La Karavelo

esperanto-editejo

© 2010, João José Mendes Quitério dos Santos
Fonte Velha, cx. 3003 – 7100-078 Estremoz – Portugal
Tel.: (+351) 268 919 000 – Telem.: (+351) 960 131 515
Tel.: (+351) 218 127 801 – Fax.: (+351) 218 127 801
lakaravelo@gmail.com – www.lakaravelo.com

titolo (título):	<i>Liberaj tempoj</i>
aŭtoro (autor):	Eduardo Novembro
eldonejo (editora):	João José Santos (La Karavelo)
editisto (editor):	João José Santos
komposto (composição):	João José Santos
kovrilo (capa):	João José Santos
kovrilfotoj (fotos da capa):	João José Santos
reviziistoj (revisores):	António da Silva Almeida (Portugal) Cindy McKee (E.U.A.) Kurt Fischer (Alemanha) Luiza Carol (Israel)
prefacoj (prefácios):	Luiza Carol João José Santos Eduardo Novembro
lingvo (língua):	esperanto
internacia libro-numero (isbn):	978-989-96312-2-9
leĝdepona n-ro (n.º de depósito legal):	310235/10

LA ĈIUTAGA HEROECO

prefaco 1

La profunda kaj pensiga rakonto de Eduardo Novembro parolas pri terura mallibereco en tempo kaj spaco, terura kaptilo de vivo. Ĝi estas vereca priskribo de la nuntempa sklaveco de laboristo. La urbo en la romano nomiĝas "Grandurbo", la protagonistoj havas kromnomojn, kiujn ili mem donis unu al la alia (ekzemple la protagonisto estas nomita "Marŝemulo"), do la loko povus esti ajna loko en la mondo. La tempo estas nuntempo, pro la fakto, ke la sociaj kaj psikologiaj tipoj ripetigatas tiom evidente. La leganto do povas mediti pri tio, ke fakte la homa socio ne iĝis pli justa aŭ pli saĝa, ol ĝi estis dum la tempo de la faraonoj...

La tuta romano priskribas unu solan tagon de la vivo de Marŝemulo, urba balaisto loĝanta ekster la urbo, apud tombejo. La strukturo de la romano estas triparta: la unua parto de la teksto priskribas la longan kaj malfacilegan frumatenan vojaĝon de Marŝemulo, de lia hejmo ĝis la laborloko (perpiede, perbuse, perŝipe...); la sekva parto de la teksto priskribas la laborhorojn de Marŝemulo; la lasta parto priskribas la vojaĝon de Marŝemulo hejmen malfruvespere. Tio estas ĉio. Sed malgraŭ la granda simpleco de la strukturo (fakte ĝuste pro tiu ĉi arta simpleco), la romano estas ekscita, plena de interna tensio, kiu igas la leganton plendeziranta kundividi la sincerajn pensojn kaj emociojn de la protagonisto. Tial, ke la fizika mallibereco de Marŝemulo, en spaco kaj tempo, ne kapablas malliberigi ankaŭ lian animon. Malgraŭ ĉio, eĉ ne konsciante pri tio, Marŝemulo ja sukcesas konservi sian bonkorecon, sian sentemon... fakte sian homecon. Kaj tiu ĉi fakto ja estas heroa (jes, heroa!), se ni komparas la balaiston Marŝemulo kun lia senkompatema estro Baptopatro, aŭ kun

la advokato, kiu provas konvinki lin malobei la leĝon, aŭ kun la egoismaj, malprofunde pensantaj televidraportistoj intervjuantaj lin laŭ stulta kliŝa maniero.

Ĉu mankas al li klereco? Li nur mallonge lernis en vilaĝa elementlernejo. Sed lia amiko Filozofo, pli klera laboristo, kiu akompanas lin plejparton de liaj ĉiutagaj vojaĝoj al la laborloko kaj reen, ŝajnas multe pli bona instruisto ol tiuj, kiuj batis lin dum lia infaneco. Pedagogion Filozofo eble ne lernis, sed li amas siajn amikojn kaj ja pensigas ilin pri ĉiuspecaj sociaj aspektoj de la vivo. Ja ankaŭ la leganton Filozofo pensigas...

Estas momento en la romano, kiam Marŝemulo trarigardas la ĵurnalojn:

“Tion, kion iu ĵurnalo anoncas, alia kontraŭdiras, kvankam ne malofte ili ĥore rimumas same en akra disputado pri la plej bona mensogo aŭ la malplej bona vero. Al li sufiĉas legi la grandliterojn por sin informi pri tio, kion li taksas grava. Satigita lia scivolemo, li foriras trenante la balailon.”

Ĉu tia reago al ĉiutagaj ĵurnaloj estas sinteno de malklerulo? Certe ne. Ŝajne, la lecionoj de Filozofo multe efikis... Li ja ŝajnas pli klera ol tiuj, kiuj senpense kredas la mensogojn en la ĵurnaloj!

Ĉu mankas al Marŝemulo distroj? La amoplenaj ŝercoj de liaj amikoj multe pli valoras, ol la sensignifaj programeroj ĉe la televido.

Havante nek tempon nek monon por televido, kinejo, teatro, restoracio ktp, Marŝemulo tamen sukcesas havi sincerajn amikojn kaj amatan familion. Lia animo estas malfermita al la beleco de la ĉielo, li kapablas kompati azenon, kiun li sentas bona kaj maljuste neglektata samkiel li mem. Li kapablas kompati la fiŝojn de la ĝardena baseno. Tiuj amasiĝis en mallarĝa malpura spaco, samkiel laboristoj

en la buso. Li kapablas respekti homojn kaj tutkore rideti al ili... Li ŝajnas multege pli riĉanima kaj riĉmensa ol la televidraportistoj, kiuj ĝenas lin per siaj stultaj demandoj. Ja, dum kelkaj momentoj, li estas intervjuata de raportistoj, kiuj preparas programeron pri la maniero laŭ kiu laboristoj pasas sian... libertempon! Kvankvam Marŝemulo respondas tute sincere kaj neniel malice, liaj naivaj respondoj fariĝas malrekta ironio kaj fortega satiro kontraŭ la societo en kiu li vivas. La raportistoj tute preteratentas liajn opiniojn pri la ebleco plibonigi iomete la etoson de la urba ĝardeno. Ilin interesas... kiel la laboristoj distras sin dum sia libertempo. Ili ne demandas, ĉu ili havas sufiĉan tempon por ripozi aŭ prizorgi sian sanon, ĉu ili entute vivas homece...

La granda paradokso de tiu ĉi romano estas tio, ke malgraŭ ĉio, Marŝemulo ja vivas "libertempe" ene de sia menso. Li ja sentas la poemecon de la sunleviĝo kaj tiun de la sunsubiro, li ja amas, zorgas, pensas kaj pensigas, serĉas kaj komunikas kun diversaj amikoj kaj konatuloj... Lia vivo ŝajnas entute vere riĉa spirite.

Antaŭ ol atingi sian domon, li devas trapasi larĝan dezertan senluman lokon, kaj la aŭtoro aliformigas tiun lokon en poemecan simbolon:

"(...) Rampa veprejo, vera dezerto. Ne dezerto de iu ajn filmo, kun kuraĝuloj renversantaj ĉiujn barierojn, herooj ĉiam venkantaj ĉe fino. Nur tutsimpla dezerto, preskaŭ privata dezerto, la dezerto de lia vivo, kiun li devige trairas ĉiutage. Nun li tretas padon, kiun nur liaj spertaj piedoj blindpalpe vidas, kiel busolo gvidanta lin sur irejo tia."

La romano finiĝas tuj poste, kiam Marŝemulo alvenas hejmen kaj trovas sian filon resaniĝintan. La rido de lia filo plenumas lian koron kaj donas al lia tuta vivo profundan sencon kaj noblecon. Paradokse, Marŝemulo ja estas heroo, ja estas kuraĝulo renversanta ĉiujn barierojn por vivteni

sian familion kaj sin mem, honeste kaj digne. Lia heroeco ne estas stereotipa aventuro de tipa usona vakerfilmo. Lia heroeco estas ĝuste la ĉiutaga homeca strebo survivi honeste.

Kaj jes ja, li ŝajnas venkanta ĉe fino, ĝuste kiel en tipa vakerfilmo...

Mi sentas, ke Eduardo Novembro posedas apartan arton de paradokso kaj humuro, de altnivela poemeco kaj vereca akurateco, kreante riĉenhavan kaj kortuŝan romanon. Pro ĝia universaleco, pro ĝia respekto pri homeco kaj justeco, tiu ĉi romano ŝajnas al mi tre leginda por la esperantista publiko.

Luiza Carol

LA ELDONO

prefaco 2

Enkonduko

Kiel eblas, ke homo apenaŭ konata en la esperanto-movado verku en erudeca stilo? Tio nur eblas, ĉar esperanto estas kultivata ne nur de mondfamaj homoj, sed ankaŭ de enpasiigintaj kaj talentaj anonimuloj, kiuj ĝin varmigis ĉiutage en siaj koroj, kvazaŭ esperanto estus ilia sekreta amo. Tia estas Eduardo Novembro. Li estas konstanta verkisto de La magazino La Karavelo ekde la unua numero, kio honorigas la revuon, ĝian stabon, legantojn kaj nian karan lingvon.

La verko

La plej filologiemaj legantoj kaptiĝas de profunda impreso pro la neorealisma verkstilo de ĉi tiu rakonto, kiu memorigas la portugallingvan leganton pri la verkistoj António Alves Redol kaj Joaquim Soeiro Pereira Gomes, inter aliaj neorealismaj aŭtoroj.

Intence mi klasifikas ĉi tiun verkon rakonto, ne pro tio ke ĝi estus malpli valora ol romano, sed pro tio, ke la teknika maniero verki, en ĝi, estas rakonta, ne romana. La ĝenro romano enhavas pli da tempa, spaca kaj rolula komplekseco, malkiel ol la ĝenro rakonto, kies ago disvolviĝas laŭ maniero pli simpla. Tamen, tia simpleco ofte donas tiom da laboro al la verkisto, kiom la komplekseco de la romano. Do, strukture ĉi tiu verko estas rakonto, kvankam ĝia longeco preterpasas la normalan nocion pri rakonto. Iel ajn, la ĝenraj klasifikoj ĉiam estas tre diskutindaj, kaj ili varias de aŭtoro al aŭtoro.

La ĉiutagaj travivaĵoj de la proletoj pugnobatitaj de la sorto kaj de maljusta socio, tia estas la socia etoso de la nerealisma skolo. Tamen, en Eduardo Novembro ne vidiĝas la revoluciema ribelo kaj la malamo. Fakte li eĉ ne kaptas la okazajn por verŝi ironion sur la vizaĝojn responsajn pri la maljusteco. Ĉe li, aŭdiĝas nur la eterna dolorkrio, kiu trovas paciĝon en la bedaŭro kaj en la akceptemo pri la malbona fato. Tipe portugala teniĝo. Ni ja estas eĉ tro pacemaj. En ĉi tiu verko, la malagrablaj kaj dolorigaj ĉiutagaj okazaĵoj prezentiĝas tiel naturaj kiel la ĉiela volbo, kiu ravas la ĉefan rolulon, kaj kiel la azeno kiun li trovas kaj kun kiu li solidaras, ĉar ambaŭ dependas de maljustaj mastroj. Jen la motivo de la librokovrilo.

La facile legeblaj verkoj donas literaturan plezuron al la komencanto, kiu per ili strukturigas la novan lingvon surbaze de nukleaj radikoj kaj fundamentaj lingvo-strukturoj. Ĉiuj amas sian lulilon, tamen neniu vivas plue en sia lulilo. La erudecaj verkoj, tia kia estas *Liberaj tempoj*, ofertas defion al pli altaj flugoj. Do, leganto, prenu la okazon legi la verkon *Liberaj tempoj* por altigi vian esperanto-nivelon.

Vortoj ne oftaj sed taŭge metitaj en sintakson fluan, por la sperta esperanto-leganto, ravigas ĉi tiun pro la lerta kapablo priskribi detalajn situaciojn kaj dinamikajn pejzaĝojn.

La unua alineo kontrastigas la ĉielan perfektecon kun la kaoseco de diktatora socio, kie la respekto al la laboristo limiĝas al la intereso de la mastro:

“Tie super... tiom super kaj treege fore... nekredeble fore... transe de apenaŭ imageblaj kaj enigmaj lontanaj ankoraŭ ne alireblaj al la homa avideco je koloniigado — tamen plezuriga spektaklo por ties vidatingo — miriadoj da

trembrilaj lumetoj punktadas la volbon, kiu vualas la senliman spacovastaĵon, kaj gvatas malsupren.”

Altnivelan priskribivon legu tra la tuta verko. Jen ekzemplo el la 2-a etapo:

“Fumanto jam alkroĉiĝinta al la enirporda manilo, ankoraŭ de ekstere profitas de volupta sorbado el cigaredo, forkraĉas ĝian ne estingitan stumpon super alies kapojn, kaj laste elsputas haladzan fumoĵeton enen de la buso.”

En multaj aspektoj, la verko estas dokumento pri iama Portugalio, en kiu, sub faŝisma reĝimo, la popolanoj sakris malkontente malbenante sian naskiĝolandon, ĝin amante samtempe, laŭ paradokso tipe portugala. Milda humuro, bakita el populuma simpleco, trapasas la verkon. Legante ĝin, mi remalkovris mian pasintan Portugalion, en kiu la manko de sufiĉaj vivkondiĉoj desperigis nin, damaĝis nian korpan kaj socian sanon kaj agacigis nin unu kontraŭ la aliaj, laŭ la deziroj de Salazaro, kiu displitis la popolon por pli facile ĝin regi.

Kvankam respektante la Fundamenton kaj la esperantan tradicion, Novembro kapablas reinventi nian lingvon per elpensitaj kunmetaĵoj kreitaj laŭ la esprimneceso de la momento, per uzado de neordinaraj PIV-aj vortoj por variigi la vortprovizon kaj nuancigi la konceptojn, kaj per sintakso esprimiva, dinamika, kaj sentiva. Per realismo plenkolora, Novembro manovras la rolulojn kaj komplekse priskribeblajn situaciojn per lerta regado de la arto verki.

La urboj kaj la homoj ne havas nomojn en ĉi tiu rakonto, escepte de tre malmultaj. Aŭ pli bone, iliaj nomoj elvenas el iliaj ecoj. Tiel Eduardo klopodas apartigi la rakonton el iu lando, serĉante la universalon, do ne la portugalon, sed la homon. Ankaŭ la klopodo restigi la verbajn tempojn en la estanteco strebas al tia universaleco kaj eterneco,

montrante pokan esperon, ke iam la vivo estu pli digna, pli justa kaj malpli amara.

La prefaco de Luiza Carol majstre profundigas la psikan analizon de la ĉefa rolulo, Marŝemulo, kaj de lia amiko, Filozofo. Ĝia legado estas nepra.

La eldonado

Tre dankeme mi ĉiam ricevas la revizian laboron de la stabo de La Karavelo. Ĉi tiun verkon reviziis, el nia kutima stabo, Kurt Fischer (el Germanio) kaj Luiza Carol (el Israelo). Al la grupeto aniĝis Cindy McKee (el Usono) kiu, tiel kiel la aliaj, fulmrapide, rigore kaj bonvoleme reviziis sian parton. Luiza ankoraŭ prefacis la verkon, donante al la leganto nemalhaveblan analizon pri la rakonto de Eduardo.

Estas devige danki mian amikon António da Silva Almeida kiu, antaŭ ol ĉiuj ni, legis kaj reviziis la manuskripton de Eduardo Novembro, kiu poste enkondukis novajn ŝanĝojn en la teksto. Kapitano Almeida, kiel ni respekteme kaj amike ŝatas voki ĉi tiun emeritulon de la portugalia aerarmeo, estas la aŭtoro de la plej rigoraj vortaroj esperanto-português-esperanto, kiun mi konas ĝis nun. Lia rigora kontrolado kaj gramatika sperto ĉiam pavimas solidan grundon, sur kiu oni povas plulabori. Mi estas unu el tiuj portugaloj kiu, antaŭ pli ol 20 jaroj, sidis en lia klasĉambro en trianivela kurso de esperanto, kie li pavimis niajn spiritojn per solida scio pri esperanta gramatiko.

Ĉi tiun libron mi reviziis, kompostis, editis, printis, kreis la kovrilon, mendis la bindadon kaj eldonis, malgraŭ la konstanta frazo de mia amiko Eduardo Novembro: "Ne indas, samideano, ne indas... tro da investo... Ĉu tio ne estas nur skribaĉo?" Ĉiuj modestaj kaj humilaj homoj devus havi apud si amikojn kapablajn agnoski ilian talenton.

Esperable la leganto konsentos kun mi, ne kun la aŭtoro. Unuafoje la internacia esperanta publiko povas vidi foton de Eduardo Novembro, kiu kaŝiĝas malantaŭ pseŭdonomo, ne permesante fotadon, kaj juĝas siajn verkojn simplaj skriboj.

La obstinemon de Novembro venkis la persisto de Santos, post multfojaj insistoj en niaj kutimaj sabataj babiloj ĉe tablo, de kie tre ofte du fromaĝaj omletoj kaj du glasoj da blanka vino rigardis al ni.

João José Santos

DANKON

prefaco 3

Al la leganto!

Ĉi tiu libro tute ne eblus sen la profunda kunlaboro de samideano António da Silva Almeida, kiu plenzorge kaj sindoneme bonvolis tien enkonduki ne nur neprajn gramatikajn korektadojn, sed ĉefe trafikajn plibonigojn. Krome, mi opinias, ke li helpis min duoble, ĉar dum verkado, mi plejofte min turnis ĝuste al liaj altkvalitaj dulingvaj vortaroj esperanto-português-esperanto, la plej bonaj portugallingvaj esperanto-vortaroj.

Ne malpli grandan helpon mi ricevis ankaŭ de samideano João José Santos, vigla entreprenanto de esperantaj kreaĵoj, ekzemple la elstara revuo *La Karavelo*, kies literatura kvalito neniam antaŭe estiĝis ĉe ni. Krom kompetentega editado kaj konsekvenca riĉigado de la tuta teksto, li kuraĝis preni sur sin la respondecon eldoni ĉi tiun libron – alimaniere ĝin neniam trafus la lumo de publikigado.

Al ambaŭ samideanoj mi estas porĉiame dankema, kaj nun mi esperas, ke nia triopa strebado en ĉi tiu laboraĵo estos ĝuinta de la legantoj.

Mi kore dankas la aliajn reviziistojn, laŭ alfabeto ordo, Cindy McKee (el Usono), Kurt Fischer (el Germanio) kaj Luiza Carol (el Israelo), kiuj finĉizis ĉi tiun verkon, aldonante al ĝi plusan valoron.

Eduardo Novembro

1-a etapo

Tie super... tiom super kaj treege fore... nekredeble fore... transe de apenaŭ imageblaj kaj enigmaj lontanoj ankoraŭ ne alireblaj al la homa avideco je koloniigado — tamen plezuriga spektaklo por ties vidatingo — miriadoj da trembrilaj lumetoj punktadas la volbon, kiu vualas la senliman spacovastaĵon, kaj gvatas malsupren.

Ĉi-sube regas altrudanta ombro, kiu apenaŭ videbligas figuron zigzagantan samnivele kun la apuda horizonto.

En tiu nudigita kampo, ankoraŭ en profunda nokto, iĝas stranga la ĉeesto de entrudulo kiu, malgraŭ sia neregula paŝado pro la malglata grundo sur kiu li vojas, ŝajnas sekvi difinitan direkton, ne haltante eĉ momenton: antaŭeniras... antaŭeniras... neniam iomete malakcelas, verŝajne impulsita de stimulgiga volo. Kien...? Tra tia soleca loko kaj je tiel frumatena horo... (...)

2-a etapo

Tian lacigan marŝadon li ĉesigas tuj post la unua individuo, kiun li trovas fronte al si, tio estas, ĝuste la lasta staranta en senfina viclinio de busatendantoj rapide longiĝanta... Tie, kelkaj homoj kadence batadas per siaj piedoj surgrunde por forigi la malvarmon. (...)

3-a etapo

(...)

— Haĥ!!!... Ho vi, knabaĉo! Atentu pri via konduto! Ĉu?!... — kaj manke de ia reago, li skoldas — Almenaŭ pardonpetu! Unue vi malĝentile preterpasis min, poste vi dolorigis mian kapon per frapo de tia surdorsa ĝenaĵo!... Atentu bone, atentu!!!...

Nur tiam la studento sin turnas kaj fitone replikas:

— Kion vi volas? Anstataŭ enveturiĝi vi restadis malantaŭ ĉi tiu kadukulino... Kaj viakaŭze mi ne povus perdi ĉi-busveturon.

— Kadukulino?!... Ĉu mi kadukulino?!... Vi, nedeca bubaĉo! Respekton!!!... Respektu la pliaĝulojn! Ĉu tiucele vi vizitadas lernejon?... Vi, lango kota! Tiom kaduka mi ankoraŭ ne estas, ke mi ne kapablu plenfekaĵigi vian buŝon! Ĉu vi bone aŭdas? — pro furiozo kaj laciĝo ŝi tute ruĝiĝas, kaj la voĉo raŭksvenas.

(...)

4-a etapo

Kiel raŭpoj elirintaj el putra vermotruo, zigzagantaj, la busoj — tradicie malfruiĝantaj — post longedaŭra kaj tediga trairado enfluas en nanan placeton. Tie ili enŝoviĝas en geometrie interstriaajn veturlarĝojn, kurbe kaj kontraŭkurbe. (...)

5-a etapo

(...)

Post paŭzo Filozofo aldonas:

— Kaj vi mem atentu ankoraŭ pri aliaj afiŝoj sur la muroj.
— li fingromontras. — Ĉi tie la instrukcioj koncernantaj uzadon de la savjako estas konfuzaj kaj nekongruaj kun la respondaj elmontro-bildoj. La ripetita “obeu, obeu” kaj “fidu, fidu”, tute ne efikos en okazo de ektimo aŭ paniko. Nur teoriumadoj... Krome la savjakojn oni gardas en lignokestoj sub la sidlokoj, kiuj estas tro pezaj por levi, des pli, ke ili estas lutitaj unu al la alia po kvin. (...)

6-a etapo

(...)

— He vi, Marŝemulo! Atendu min!... Tiel mi ne sukcesas akompani vin... — plendas la kunulo.

— Senkulpigu min, Filozofa! Mi ĉiam forgesas, ke vi estas pli granda kaj pli ronda ol mi. Sed vi ja iomete rampas... Se vi ruliĝus, ĉu vi ne pli rapidus?... — moka aludo al la alia bareleta figuro. (...)

7-a etapo

(...)

— Vi surprizigas min! Ĉu vi ne estis iama sindikatisto? Ĉu vi neniam partoprenis en strikoj? Kial vi nun malkonsentas?

— Ja vi pravas, amiko. Sed jam de multaj jaroj mi eksigis. Post kiam la sindikatoj aniĝis al politikaj partioj, mi ĉion forlasis por ne submetiĝi al ties senhonoriga disciplino, kiu devigus min voĉdoni eĉ kontraŭvole. Tio kolizius kun mia teniĝo libere pensi, libere esprimi, libere agi, pri kio mi nepre ne rezignas! (...)

8-a etapo

(...)

Ne laŭ siaj propraj nomoj laboristoj ŝatas alvoki unu la aliajn, sed laŭ kromnomoj de ili mem ŝerce elpensitaj: kelkfoje eĉ ĝenige ridindigaj por la koncernatoj. (...)

9-a etapo

(...)

— Bonan matenon, balaisto. — sektone lin salutas pavfiera ulo rafineme vestita: blanka kolumo kaj elstara kravato enkadrigita sur ĉemizo kun blu- kaj kremkoloraj strekoj. La jakon li tenas alkrôcita sur la maldekstra montrofinĝro. Ŝlosiloj tintas en lia dekstra mano. (...)

10-a etapo

(...)

Nehaste, Marŝemulo forprenas de sia ligna valizo, unu post alia, termoson kun supo, bonodoran raguon ene de argilpoto, kaj panpecon volvekovritan per buŝtuko. (...)

11-a etapo

(...)

Kun rigardo celanta la grundon, de kie li forbalaas la rubaĵaron, Marŝemulo ekvidas inajn piedojn alproksimiĝantajn sur ekvilibrigaj kalkanumoj. Tuj scivolemo lin stimulas esplori la suprestarantajn beltornajn krurojn, ene de ŝtrumpoj kun enteksaj arabeskoj okulfrapaj. Laŭ inversigitaj konusoj, tiuj gamboj volupte soras ĝis enŝoviĝado sub minijupon pridisputanta sian longon kun la larĝo de la zono, kiu ĝin subtenas kaj ornamas surtalie. Li daŭre plezuriĝas ĉe vido de umbiliko traborita de metala breloko, oaze elstaranta meze de nudsilkeca haŭto. Iom pli supre ŝiajn du brusttuberojn bante apenaŭ kovras multkolora rubando. Alte sidanta sur la kolo imponas juna viglesprima vizaĝo kun blondaj harfasketoj pende vualantaj la bluecon de ŝiaj okuloj. Post zigzaga har-disigo sekvas ponevosto glisanta sur ŝian senvestan dorson. Ŝi ridetas al li. (...)

12-a etapo

(...)

Marŝemulo konfuziĝas pro rideto tia ĉe nekonata junulino sin adresanta al li.

— Ni venas — plurale, ĉar samtempe ŝi almontras kelkajn apud ŝi — de la televido por intervjui vin.

Li ekbalbutas eĉ antaŭ ol malfermi la buŝon, kaj lia korpo kvazaŭ aliformiĝas en demandosignon.

— Ne embarasiĝu... Apenaŭ kelke da demandetoj. Facilaj respondoj viaj. Tio estos tre rapida... ĉu? (...)

13-a etapo

(...)

— Kion diras ĉi tiu ulo? Ĉu vi komprenas lian volapukaĵon? Vi jam estis alilande...

La alparolato ŝultrumas, malĝentile turnas la dorson al la eksterlandano, kaj grumbblas:

— Mi ne volas kompreni! Ĉu li ne estas en nia lando? Do, li parolu nian lingvon!

— Eble li ne scipovas... (...)

14-a etapo

(...)

— Ne gravas ĉu ĉi-tiuj fekaĵoj difektiĝas, ne gravas ĉu ni, la pagintoj, mistrafas transporton hejmen... Nur gravas subteno de ĉi tute absurda kadraro kaĝa. Kaj kiam ia ajn problemo estiĝas, ni povas kalkuli pri la entreprenaj funkciuloj diplomitaj je antipatio por defendi siajn mastrojn... — eĉ blovanta pro laciĝo, Filozofo ne forlasas sian kritikisman sintenon. (...)

15-a etapo

(...)

— Ne valoras la penon kuri. — opinias Filozofo, paŝirante kune kun la du aliaj — Oni jam bone scias, ke tiuj fiaj ŝoforoj fuĝas tuj, kiam ili perceptas ĵusan elŝipiĝon de pasaĝeroj.

La placo rapide pleniĝas je homoj disigantaj al plurbusaj deirpunktoj, kie ekkreskas spaliroj.

— Kiun veturon vi prenos? — demandas Marŝemulo al Kontisto.

— Tiun de la 220-a linio. (...)

16-a etapo

(...)

Subite ridado, sonora ridado, freŝa, infana ridado. "Ankoraŭ vekanta! Ankoraŭ vekanta!... Filĉjo!... Li jam resaniĝis!...". Lia vizaĝo dismalfermas senbridan ĝojon de la koro ĝis la lipoj. "Ankoraŭ vekanta!!!...". Lia tuta korpo impetas, la mano etendita vigle turnas la anson de la pordo, kiu, per lia forta ekpuŝo knaras surgrunde de la barako.

Tuj kontraŭ lian bruston kolizias etuleto, brakume kriante:

— Paĉjo!!!...